

Kapoj pensas



Mi kutimis pensi, ke la plej gravaj kutimaj problemoj estas la perdo de biodiverseco, la ekosistema kolapso kaj la klimata ŝanĝo. Mi pensis, ke tridek jaroj da bona scienco povus pritrakti pri ĉi tiujn problemojn. Mi malpravis. La ĉefaj mediaj problemoj estas egoismo, avido kaj apatio, kaj por trakti ĉi tiujn ni bezonas kulturen kaj spiritan transformon. Kaj ni, sciencistoj, ne scias kiel fari tion. ● (James G. Speth, usona advokato kaj naturmedia defendanto)

Zamenhof estis sufiĉe modesta por konscii pri tio, ke la lingvo, kiu estas socia fenomeno, ne povas esti kreaĵo de unu sola homo, kaj li konfidis al la esperantistoj la ellaboron kaj la perfektigon de la lingvo. Kaj unu el la plej geniaj trovaĵoj de la Majstro estis, ke Esperanton, tuj post ĝia naskiĝo, li fianĉigis al poezio. ● (Kolomano Kalocsay)



Esti Esperantisto signifas ne nur lingvoscion. Ĝi estas destino. Misio. Sapiro al pli bona mondo. Vera Esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj ili estas Esperantisto jam antaŭ ol li lernas la lingvon. Esti Esperantisto signifas ne nur lingvoscion. Ĝi estas destino. Misio. Sapiro al pli bona mondo. Vera Esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj ili estas Esperantisto jam antaŭ ol li lernas la lingvon. ● (Julio Baghy)



Gaja Haveno


Porto Alegre, RS, Brazilo | Jan/Mar 2020 | N-ro 49 | Kreita en 1997
www.gajahaveno1.blogspot.com

La portugala volis malproksimiĝi de la hispana

Dum pli ol mil jaroj de ĝia historio, Portugalio ĉiam sentis sin minacata de la najbara Hispanio, pli granda kaj pli potenca. Unu el la manieroj kiun la portugaloj trovis por refortigi sian aŭtonomion estis la lingva izolado, la rifuzo de iu ajn ago kiu povus reprezenti alproksimiĝo al la hispana.

Pro tio, en la skribado, ili adoptis la LH kaj la NH de la provenca lingvo kaj ne la Ñ kaj la LL de la hispana. Dum la hispanoj ĉiam adoptis politikon de adaptado aŭ kreado de propraj terminoj en ilia lingvo, la portugaloj dum jarcentoj sin ligis umbilike al Francio, importante centojn da vortoj kaj eĉ sintaksajn konstruaĵojn el la franca, se ne paroli pri propraj nomoj kiel *Alexandre* (kiu devus esti *Alexandro*, ĉar estas per O, ke finiĝas la masklajn nomojn en la portugala). ●

↳ **Marcos Bagno**, lingvisto, en sia artikolo *Espanhol para todos e já!* (*La hispana por ĉiuj kaj nun!*, en la revuo *Caros Amigos*)



Gaja Haveno

Redaktas César Dorneles Soares
dornelespoa@gmail.com

Eldonoj PDF-forme: www.esperantors.net.br

Miks-



Polpo havas tri korojn kaj naŭ cerbojn, unu kiu estas centra kaj aliaj ok po unu en ĉiu tentaklo. (*Superinteressante*) ●●● **No hay pedo.** Ne estas furzo. Meksika esprimo por trankviligi iun kiu faris eraron. ●●● **En Usono** je ĉiu kvin jaroj oni mezuras la nivelon pri mensa sano, kiu kutime varias laŭ 1% supren aŭ malsupren. En la lasta periodo, la rezultoj estis malsimilaj: inter adoleskantoj, la niveloj de deprimo kreskis ĝis 30%. Unu el la motivoj estas tio, ke malgrandiĝas la interagoj vid-al-vide, anstataŭitaj de la saĝtelefono. La personaj interrilatoj estas antidoto kontraŭ la deprimo. (Tal Ben-Shahar, israela psikologo kaj filozofo, en intervjuo al la taggazeto El País, Hispanio) ●●● **La 5a Sud-Brazila Renkontiĝo de Esperanto** okazis en Santa Maria, RS, inter la 7a kaj 9a de oktobro, 1989, sub la temo *Paŝoj al Integriĝo* – kuna realigo de Esperanto-Societo de Santa Maria kaj Esperantista Societo de Porto Alegre (ESPA). Al ĝi enskribiĝis 56 homoj inter ili tri argentinaj geesperantistoj. El la programo eltariĝis prelegoj de Geraldo Mattos (Curitiba), Clara de Hess (Argentino) kaj Josias F. Barboza (Braziljo) kaj prezentaĵo de PEATRO – teatra trupo de PEA-Paranaa Esperanto-Asocio. (Referenco: ABC n-ro 6, Printempo 1989, oficiala organo de Esperantista Societo de Porto Alegre) ●●● **Se la Tero** havus la grandon de bakterio, la Lakta Vojo havus la diametron de la Tero. (*Superinteressante*)



● **En Quatro Cinco Um** de dec/jan 2019, brazila revuo pri libroj, en recenzo skribita de Luisa Geisler pri speco de sciencfikciaĵoj kies termino portugallingve estas *distopia* (ia *negativa utopio*), ŝi mencias la fakton, ke “unu el la palacetoj de la plej riĉa homo en la mondo havas 25 banĉambrojn dum ĝiaj funkciuloj estas kontrolataj laŭ produkteco tiamaniere, ke ili urinas en botelojn por ne perdi tempon” kiel ekzemplo de la multnombraj sociaj *negativaj utopioj* de tiu civilizo kies plej granda aspirado ŝajnas esti vendi, profiti kiel eble plej multe. Fama ekzemplo de tia utopiaĵo estas la romano *1984*, de George Orwell (1948).

● **Ziko M. Sikosek**, en sia bonega *Esperanto sen Mitoj*, verko kiu ĉiu interesato pri propagandado de E-o devus legi, en la subero *Malamikeco kontraŭ la angla*, mencias la jenan okazintaĵon rakontitan de Jouko Lindstedt: *En la [UK] de Ateno okazis jene: (...) nian aŭtobuson eniris profesia grekino-kvidistino. La kompatindulino kuraĝis komenci paroli en la angla salutvortojn, sed ŝin silentigis protestoj de la ekskursantoj.* Kompatinda ulino! Eble ĝis hodiaŭ ŝi havas la jenan ĝeneralan impreson pri E-istoj: grupo da maltoleremaj, fanatikaj kaj malafablaj homoj, kiuj kontraste sin prezentas kiel parolantoj de *lingvo por la paco*... Mankis en la menciita okazaĵo respekto al iu homo kiu simple estis tiumomente plenumanta sian profesion taskon se ne paroli pri la fakto, ke manifestacioj kiuj reprezentas ian malamikecon kontraŭ la angla lingvo estas kontraŭefikaj por bona propagando pri Esperanto.

Survoje al
5000 paĝvidoj |

www.gajahaveno1.blogspot.com

Thomas Cook:

la pioniro de la modernaj vojaĝoj en grupo

→ **João Nicolau de Araujo Aloisio**, vojaĝaganto

La homo estas agema estulo, kiu ĉiam ŝatis alilokiĝi kaj traesplori aliajn lokojn, ĉu sola, ĉu akompanata. Mi legis antaŭnelonge kuriozan fakton, eltrovitan de kelkaj arkeologiaj esploroj: antaŭ ĉirkaŭ 13 mil jaroj, homgrupoj loĝantaj en kaverno de Madasin, en la francaj Pirineoj, jam organizis ekspediciojn ĝis la maro kaj poste ili revenis. En Grekio en la 7a jc a.K. homoj organizis grupojn ĉiukvarjare, por spekti la olimpiajn ludojn.

Per tiuj du menciitaj situacioj, ambaŭ el malsimilaj epokoj kaj kunteksto, ni povas percepti la neceson kiun la homo ĉiam havis por ekvidi diversajn pejzaĝojn kaj lokojn, atenta al la plej diversaj celoj, plufarante tion ante eĉ en la hodiaŭaj tagoj.

En la jaro 1840, jam ekzistis granda fervoja ekspansio en Eŭropo, kiu faciligis la ĝeneralan alilokigadon en la Malnova Kontinento, sed la horaroj kaj tarifoj estis kompleksaj kaj la opcioj pri gastigado estis tre multekostaj, kun malmultaj ŝparemaj ofertoj. En 1841 Thomas Cook, iu meblofaristo, baptista misiisto kaj vendisto de biblioj, havis la grandan ideon, kiu poste igis lin konata kiel la *patro de la moderna turismo* kaj la *unua vojaĝaganto en la mondo*: je la 5a de julio de la menciita jaro, meze de la eŭropa somero, li arigis 570 homojn, aĉetis kaj revendis trajnbiletojn kaj irigis tiun egan grupon al renkontiĝo de la *ligo kontraŭ la alkoholismo*, elirante el la urbo Leicester ĝis Loughborough kaj veturante tra 12 mejloj (ĉirkaŭ 19 km).



La ideo bone sukcesis kaj sekve al tio nia iniciatema

angla entreprenisto ekorganizis homgrupajn vojaĝojn, komencanta tion kio poste fariĝis la plej konata vojaĝagantejo en la mondo: *Cooks Tours*. De tiam la brila ideo de Thomas Cook diskoniĝis kaj tra la tempo pli da grupoj de vojaĝoj ekaperis en nova epoko de turismo plibone organizita kaj atenta al la bonstato de la pasaĝeroj. ● (fragmento).

→ Artikolo origine publikigita ĉe <https://www.meubrasildiario.com.br/2019/11/07/viagens-em-grupo-de-thomas-cook-aos-dias-atuais/>. Esperantigis César Dorneles.

Ĝuste ĝuu!

www.facebook.com/groups/esperantonun

Survoje al 500 membroj




La 28an de marto, 16h,
ĉe Aromaz Café,
Rua da Praia Shopping

Kafpaŭzo



→ César Dorneles



● **Lenio Marobin**, el Lajeado, RS, kiam venas al Verda Kafo, kutime kompleksas nin kaj GEAn per donaco de periodaĵoj, inter ili La Brita Esperantisto. La artikolo de Bill Chapman publikigita en ĝia n-ro 987 de aŭgusto 2019 vekis mian specialan atenton: temis pri Léon Bollack (1859-1925), franco loĝanta en Londono kaj unu el la multaj kreintoj de planlingvoj, kiuj aperis kaj malaperis en dua duono de la 19aj jc, escepte de Esperanto kiel la langanto bone scias.

La lingvo nomiĝis Bolak, kiu signifis samtempe *lingvo-n blua-n* aŭ *genia-n kreaĵo-n*, kaj estis prezentata de la kreinto al la publiko en 1899.

Ĝi miksas elementojn de naturaj kaj *logikaj* lingvoj, klarigas Chapman. Kontraŭe al Zamenhof, Bollack tute ne agnoskis la valoron de poezio en planitaj lingvoj kaj li kutimis fanfaronis pri la perfekteco de sia inventaĵo. Rezigninte pri la projekto, li fariĝis poste adepto de Ido (1908) kaj onidire estis li – atentu, Miguel Bento... - kiu proponis la bluan kiel simolan koloron por la menciita lingvo.

● **Estas homoj** kiuj parolas al siaj hundoj kaj katoj. Iomete freneza tiu afero! Mi parolas nur al miaj foliaĵoj!

● **Kia ekonomia sistemo** estas tiu kies interesoj de la akciuloj restas sur ĉio kaj ĉiuj?


Poezia rubriko

Soleco

Ŝafisto iras sur montaro,
kie birdkantoj sonas;
kun la Natur' en solidaro
solecon li ne konas.

Sed iras mi sur urbostratoj,
kie la bru' senĉesas;
kaj meze inter la homfratoj
fremdule mi solecas.

→ **John Sharp Dinwoodie** (1904-1980), skota esperantista poeto, pastro



“**Mi amas la vorton mamihlapinatapai** el la lingvo jaghana, parolata sur la duoninsulo de la ĉilia Tierra del Fuego. La vorto estas tre precisa kaj konciza en sia signifo. Provi ĝin traduki ne eblas per malpli da vortoj ol *rigardo inter du homoj, el kiuj ambaŭ esperas, ke la alia proponos ion, kion ambaŭ deziras, sed nek unu nek la alia pretas mem sugesti aŭ proponi.*” (Ghil'ad Zuckermann, en la artikolo *Revivigi lingvon por redoni dignon al la homoj*, en Brita Esperantisto de aŭg/2019 - elanglangis Trevor Steele) ● ● ● **En la angla lingvo**, la vortoj *ewe* (ŝafo) kaj *you* (vi) havas la saman prononcon. Samkiel *eye* (okulo) kaj *I* (mi). La vorto *set* havas ĉirkaŭ 450 signifoj.